

NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas: Manolo Parra
manolo.parra@yahoo.es

JANUARO 2011

ALVOKO AL ĜENERALA KUNSIDO

Laŭ preskribas la 11^a artikolo de nia statuto, la Prezidanto alvokas ĉiujn membrojn de Madrida Esperanto-Liceo por Ĝenerala Kunsido okazonta la lundon 24an de januaro je la 18:30 horo je dua alvoko en c/ Rodríguez San Pedro 13-3-7, sub la sekva tagordo:

- 1.- Lego kaj aprobo aŭ malaprobo de la lasta protokolo
- 2.- Informo pri membraro
- 3.- Prezento kaj (mal)aprobo de la kontoj de la jaro 2010
- 4.- Prezento kaj (mal)aprobo de la buĝeto por 2011
- 5.- Prezento kaj (mal)aprobo de la raporto de aktivaĵoj de 2010
- 6.- Prezento kaj (mal)aprobo de la programo de aktivaĵoj por 2011
- 7.- Demandoj kaj proponoj

La Prezidanto: Juan del Castillo

Baldaŭ la membroj ricevos la koncernan dokumentaron.

REKOTIZO POR 2011

Estas tempo por ke la membroj pagu sian rekotizon al la Liceo, ĉu kontante al la kasisto (Pepe Platas) okaze de la kunsido, ĉu per transpago al la banka konto 0081-7110-98-000 126 6730, ĉe Banco Sabadell/Atlántico, kun klara indiko de via nomo.

Ankaŭ estas tempo por ke la ne-membroj engaĝiĝu en sia loka E-klubo. Pensu ke klubo sen membroj ne povas ekzisti.

La kotizo plu restas senŝanĝa: 12 eŭroj, almenaŭ ĝis la tago 24^a, ĉar la kunsidontoj povas ŝanĝi ĝin.

ESTIS BONE LA Z-FESTO

Laŭ anoncote, ĝi okazis la dimanĉon 12an. En iu momento mi kalkulis ĝis 28 homojn (el kiuj nur 9 membras en MEL).

Ni ĝuis bonegan prezenton de ĥora kvarteto, kun Manolo Pancorbo kaj tri membroj de la ĥoro Verda Stelo, inter ili la fondinto kaj la nuna direktoro. Ankaŭ ni havis poezian deklamadon kaj serion da tri rapidaj prelegetoj (peĉakuĉo) sub jenaj titoloj:

- kalkulsistemo por atribui la semajntagon al kiu ajn dato (Manolo)
- Madrido, ĉefurbo de Armenio (Andy)
- esperantistaj patroj de geniuloj (Toño)

VIZITIS MADRIDON ...

Masumi kaj Tacuo Hughimoto, tre simpatia geparo el Japanio. Ses madridanoj akompanis ilin je vespermanĝo la 22an de decembro.

VIZITOS MADRIDON ...

Augusto Casquero, la 10an de januaro.

Jean Pierre Lambert kaj amikino, de la 28a ĝis la 31a de januaro.

HISPANA E-KONGRESO EN SAN LORENZO DEL ESCORIAL

Datoj: de mardo 28^a junio ĝis sabato 2^a julio 2011.

Kongresejo: Kulturdomo de San Lorenzo, situanta en Unua Domo de Metioj, historia konstruaĵo projektita de Juan de Herrera samstilo kiel la Monaĥejo.

La partoprenantoj havos eblon ricevi atestilon pri Esperanto laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro, organizata de Universala Esperanto-Asocio kaj Ŝtata Lingvoekzamena Centro de Budapeŝto. Por ricevi plian informon konsultu sekvan paĝon:
<http://edukado.net/ekzamenoj/ker>

Baldaŭ sekvos pliaj informoj pri la programo, kotizoj kaj aliaj detaloj. Por ajna konsulto aŭ propono por ellabori la definitivan programon, skribu al: info@esperanto.es

19-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo

Loko: MALGRAT DE MAR (BARCELONA) HISPANUJO

ADRESO: Hotelo. "Cartago Nova***" str. Passeig Maritimo 92

Dato de la 1-a ĝis la 8-a de oktobro 2011

Sub aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo

Koresponda adreso:

Luis Serrano Pérez. Apartado 423. E-08200 SABADELL (Barcelona) Hispanio.

Tel. (+34)93 727.50 21. Rete: luis_serrano@ya.com kaj luis_serrano@mixmail.com

<http://personales.ya.com/semajno>

TRIOBLA E-KONGRESO EN SAN-PAŬLO

San-Paŭlo invitas vin por grava triobla evento de la 9^a ĝis la 14 de julio 2011. Esperantistoj el la tuta Ameriko kunsidos kun brazilanoj kaj junuloj en unu sola granda kongreso. Oni atendas pli ol kvincent kongresanojn. La granda, moderna kaj vigla urbo San-Paŭlo meritas vian ĉeeston. Temas pri unu el la plej mirindaj metropoloj en la mondo, riĉa je kulturaj allogaĵoj, turismaj vidindaĵoj, multnombraj loĝeblecoj kaj bolanta komerca aktivado. Pli da informoj :
<http://easp.org.br/kongreso>

El TEJO-aktuale n° 260

ESPERANTO EN AMASMEDIOJ

La 29^a de decembro aperis tre bona artikolo pri Esperanto en la ĵurnalo "Diari de Balears".

<http://dbalears.cat/actualitat/Opinió/feli-an-novan-jaron-esperan-a.html>

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj **konversaciaj rondoj** okazas ĉiulunde ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3^o-7, tel. 914 468 079.

ESPERANTO-LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal

San Alejandro 6-4^oB-EXT

28005 MADRID